

de profesoro *Bociort* per sia inspira artikolo pri la estetiko de beletra verko. Kiu Esperantisto ne interesiĝas pri parolproblemoj de infanoj denaske lernantaj Esperanton, pri kiuj raportas profesoro *Nagata*? Profesoro *Dudich* maltrankvilas pro la ĝenerala krizo en nia postindustria socio pro superekspluatado de energirezervoj kaj bildigas la koncernajn perspektivojn de geologiaj sciencoj. D-ro *Kavka* forte argumentas pri la graveco, konservi la fundamentan fonemon ĥ en la Esperanta lingvouzo ĝenerale kaj en la Esperanta fakscienco speciale. La artikolo de profesoro *Cumberlidge* kaj kun-aŭtoro prezentas avantaĝojn kaj malavantaĝojn de nova, racia, Esperantlingva nomiga sistemo kompare kun la ekzistanta, internacie kaj mondwide uzata konvencia sistemo, ordiganta la vivan animalan kaj vegetalan mondon. Krom la varieco de la temoj estas notinda ankaŭ la internacieco de la aŭtoraro: troviĝas en tiu kajero artikolo de Rumano, Japano, Hungaro, Ĉeĥo, Usonano kaj Germano.

Post la originalaj artikoloj -ĉiuj verkitaj omaĝe al nia prezidinto-sekvas nove enkondukata parto, nome "*Scienca Elio*". Tiu rubriko celas prezenti estonte sciindaĵojn, kiujn ISAEanoj legis en proprafakaj literaturaĵoj kaj konsideris komunikindaj al sam- kaj nesamfakuloj. *Scienca Elio* penos esti interesa resumo de fakaj artikoloj kaj pensigaj sciigoj el naci-lingvaj ĵurnaloj, sciencaj periodaĵoj kaj ĉiutagaj gazetoj. La rubriko celas esti distra legaĵo en ĵurnalista stilo, samtempe peranta sciencan kaj soci-kulturan sciadon. Tiun novan partaĵon oni konsideru kvazaŭ "forumon de ISEAnoj" aŭ "liberan tribunon de estontaj aŭtoroj", kiuj estos - la ISAEanoj mem! Mi esperas, ke tiu nova rubriko ne restos seneŝa sed, kontraŭe, ĝi stimulos legontojn, mem -kvazaŭ aŭtore- kunlabori: ne per longaj artikoloj el propraj plumoj, sed per konciza komuniko de nacilingvaj sciindaĵoj kaj interŝanĝo de interesaj informoj el diversaj fakoj. La de mi en tiu kajero reĥitaj sciindaĵoj (estante natursciencisto kiel nia ŝatata prezidinto, mi kompreneble elektis, dediĉe al li, temojn el niaj komunaj labor- kaj interes-kampoj) koncernas precipe ekologiajn problemojn, kiuj ja kvazaŭ kiel ruĝa fadeno tiriĝas tra esploro kaj scienco. Novaj teĥnikoj estos ŝlosilteĥnologioj por la nova jarcento. Ĉu la teĥnike kaj ekonomie plej optimuma problemsolvo en la konfliktplena rilato inter homo kaj bestaj kunvivuloj en komuna, detruiganta vivmedio estos ankaŭ ekologie la plej bona? Por kunagi pri estontaj problemsolvoj, ni bezonos ĉiam novan scion. Kaj ni uzu ĉiujn fontojn por pliigi kaj peri sciadon.

Sed nun: ek al legado de la sekva laŭdacio pri "kapitano, kiu forlasas la ŝipon". Mi estas firme konvinkita, ke en nia komuna strebado tute ne temas pri "sinkanta ŝipo"...

Sincere via

*Rüdiger Sachs*

## Carl STOP-BOWITZ - "ISAE-ano Numero Unu"

Laŭdacio de *Wera BLANKE* okaze de la planata retiriĝo de la longjara prezidanto dum la Ĝenerala Kunsido de ISAE 1996-07-23 en Prago

Ĉu la kapitano volas forlasi la ŝipon - por ke la vaka stirilo voku novan direktiston? Ĉu li tro bone gvidis la ŝipon tra la jaroj - ke ĝis nun neniu kuraĝis asisti kaj anstataŭi lin?

Karaj kolegoj, ni ĵus aŭdis dum nia Praga kunsido la vortojn de la ankoraŭa prezidanto - en tia emociiga momento decas halti por kelkaj minutoj kaj memorigi pri homo, kiu donacis grandan parton de sia vivo al nia komuna afero. Ne eblas, en limigita tempo, diri ĉion direndan - mi do elektas kvar aspektojn el la biografio de "CBS", nome 1.) Vivo kaj kariero, 2.) La Esperantisto-Esperantologo, 3.) Vasta gamo da interesiĝoj, kaj 4.) La Terminologio.

Vivo kaj kariero

*Carl Stop-Bowitz* naskiĝis 1913, la 8an de decembro, en *Eidsvoll*, Norvegio. Li studis natursciencan kaj matematikan, specialiĝis pri zoologio kaj finis la studadon kiel licenciato pri naturscienco ĉe la universitato de Oslo - al kiu li daŭre restis fidela. Inter alie li estis kuratoro de la Universitata Zoologia Muzeo kaj laboris kiel gimnazia lektoro.

En 1941 aperis lia unua scienca verko pri "La Gliceredoj de Norvegio", unu el la familioj de marfundaj vermoj. Lia doktoriĝa disertacio temis pri la norvegaj lumbrikedoj, la granda familio de tervermoj. CSB ricevis plurajn stipendiojn por zoologiaj esploroj, prilaboradis sciencekspediciajn materialojn el diversaj mondopartoj kaj faris prelegvojaĝojn al Japanio (1965), Suda Ameriko (1979) kaj Aŭstralio (1983).

En 1966 la universitato de Oslo vokis lin profesoro pri zoologio. 1976/77 li estis direktoro de Zoologia Instituto ĉe la universitato de Oslo - sed por 1978 rezignis pri reelektado. Supozeble ĉar gravis aliaj, memelektitaj taskoj. Ja malantaŭ tiu unua, kvazaŭ "oficiala" vivo troviĝas alia, dua, nedisigeble interplektita kun ĝi.

## Esperantisto kaj Esperantologo

En 1928 la 15jara knabo CBS eklernis Esperanton per norvega radio-kurso. Du jarojn poste li perfektigis sin en "la granda kurso", al kiu Norvega Esperantista Ligo (NEL) estis invitinta Andreon *CSEH*, kaj kiu kaŭzis konsiderindan ekfloradon de la norvega movado. 1931 ĝis 1938 li estis sekretario de la Klubo Esperantista en Oslo. 1939 li fariĝis ties vic-prezidanto kaj 1940 por 7 jaroj la prezidanto de la urba esperantistaro.

Samtempe, kvazaŭ nature, evoluis lia "verda kariero" en pli vasta kadro. 1933-39 li estis Ĝenerala Sekretario de NEL, post dum 30 jaroj ties prezidanto (1947-77). Dum tiu tempo, en 1961, li oficiale instruis Esperanton en gimnazio - kadre de lerneja kampanjo de NEL, iniciatita de li. 1977 li fariĝis prezidanto de norvega Eldonejo Esperanta.

El la lando al la mondo: 1949 li elektiĝis membro de la Akademio de Esperanto (AdE), kie li aktivis en pluraj fakoj. 1958 li proponis kaj estris kiel unua la "Sekcion pri Prononcado". Nuntempe li estas direktoro de la Akademia Komisiono pri Aprobo de Fakaj Terminaroj, fakte lingva kontrolinstanco. Li estis la ĉefkunlaboranto pri Zoologio de Plena Ilustrita Vortaro (PIV). Nun, dum la reviziado de PIV, li plenumas saman taskon. Dum la tradukado kaj prilaborado de la "Poŝatlaso de la Mondo", kiun prizorgis d-roj *Kavka* kaj *Pumpr*, li rolis kiel "kunaŭtoro n-ro 1". 1952 li estis LKK-prezidanto de la 37a UK en Oslo. 1956 li fariĝis Komitatano de UEA, 1974 ĝis 1980 li estis ties vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado. Pri la delegita reto li respondecis de 1977 ĝis 1980.

CBS partoprenis 27 Universalajn Kongresojn de Esperanto (UK) kaj per 12 prelegoj riĉigis la sciencon programon de la Internaciaj Someraj Universitatoj (ISU). Dum la UK en Bergen (1991) li rektoris la Internacian Kongresan Universitaton (IKU). Dum la Someraj Universitataj Kursoj (SUK) de 1972 ĝis 1976 en la Universitato de Lieĝo, Belgio li kontribuis per 5 prelegserioj al la altnivela programo. De 1974 li estas la prezidanto de tiu kleriga institucio. Kvankam bedaŭrinde de kelkaj jaroj ne plu okazas tiaj aranĝoj, je nia komuna bono postrestas 34 prelegtekstoj kiel presitaj manuskriptoj. Ekde 1985 CSB estas Asociita Membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kie li -intertempe plenrajta membro de AIS kaj orda profesoro- prezentis zoologian studkurson.

Aparte interese por ni kompreneble estas la agado de CSB por la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). La restarigo de la asocio post la dua mondmilito (1947) estas ĉefe lia merito. Sed nur 1946 ĝis 1949 li tiam prezidis, poste retiriĝis en la vicprezidantecon. Tamen li kronis sian aktivecon por ISAE per dua prezidanta periodo, nome de 1981 ĝis 1996! Dum

tiu ĉi duonjarcento li multe verkis por Scienca Revuo kaj 1975 ricevis la unuan "Premio Popoviĉ" pro la referata artikolo "Areoj de animaloj. Ilia determinado kaj fluktuo". De 1936 li jam estas delegito de ISAE por Norvegio -do, en tiu ĉi jaro 1996 li povas festi sian 60-jaran jubileon kiel Landa Delegito!

## Vasta gamo de interesiĝoj

Kiel zoologo *Carl Stop-Bowitz* okupiĝadas pri diversaj familioj de poliĥetoj, speciale pri la pelagaj poliĥetoj, kiuj vivas naĝante en la maro. Lian apartan ŝaton ĝuas la lumbrik(ed)oj, kiuj senlace helpadas al la terkulturistoj manĝante-pliboniĝante la grundon dum 24 horoj ĉiutage. Des pli ĉagrenige la fenomeno -de li esplorita- ke vintre tiuj utiloj foje aperas sur la neĝo por tie morti.

"Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la Nordo?" demandis lia prelego en Tokio. Kaj la respondo estis: "Jes, en senglaciaj rifuĝejoj de norvegaj bordoj!" Sed CSB ankaŭ pli ĝenerale interesiĝis pri "la natura ekonomio de la maro" kaj la "faŭno de *Hardangervidda*". Pri ĉi tiuj pli proprasence fakaj demandoj li studas, esploras kaj verkas diverslingve - norvege, france, angle, sed ankaŭ Esperante - kaj al ĉiuj siaj etnolingvaj sciencaj verkoj li aldonas resumon en Esperanto. Siajn ĝisnunajn rezultojn li ankaŭ disponigis al norvegaj leksikonoj kaj aliaj natursciencaj verkoj.

Aparte en Esperanto li krome traktis pli ĝeneralajn demandojn, ekz. "La deveno de la homo" (ISU, 1956); "La parenceco inter vertebruloj" (ISU, 1957); "La Esperanto-Movado. Ĝia historio, organizo kaj nuna stato" (kun *J.R.G. Isbrücker* 1948, dua eldono 1996); Lingvaj Problemoj (ekz. protektado de la ĝenerala norvega lingvo *Riksmål*), Esperanto-vortstrukturo kaj toponimiko, gramatikaj demandoj, prononcado. Pri la jubileulo komparu ankaŭ la omaĝojn de *B. Popović* (Scienca Revuo Vol. 24, n-ro 5 (103) kaj *J. Kavka* (Scienca Revuo Vol. 34, n-ro 2-3 (144-145), kiuj registras grandan parton de liaj verkoj.

## La Terminologio

Jen ĉapitro, por mi aparte grava kaj impona, ĉar ĝi koncernas terenon, en kiu mi mem dum aro da jaroj forte engaĝiĝis kaj sen kies serioza prilaborado Esperanto ne havos ŝancon pli ol nun roli en la monda komunikado. Evidente klopodoj pri terminologiaj kaj nomenklaturaj demandoj tiriĝas kiel "ruĝa fadeno" tra ĉiuj aktivecoj de *Carl Stop-Bowitz*.

1941 : La unua scienca verko pri "La Gliceredoj de Norvegujo", verkita angle kaj france (kun Esperanto-resumo) jam aplikas la sciencan sufikson "-ed" por la zoologiaj familioj, kiun li ne nur "inventis" (t.e. proponis), sed ankaŭ "enkondukis" (t.e. li faris ĝin intertempe akceptita de samfakuloj). La samo validas pri lia propono de la termino "specio" - kiun la zoologoj kaj botanikistoj nepre bezonas, ĉar "speco" estas tro ĝenerala. Ĝis hodiaŭ la kreinto de la esprimo mem trovis kaj priskribis 26 "speciojn" de polihetoj novajn al la scienco.

1958 : Li partoprenis la 15-an Internacian Kongreson de Zoologio, kiu adoptis la "Internacian Kodon de Zoologia Nomenklaturado". Tiun ĉi regularon, kiu baziĝas sur la sistemo de Linné, CSB ripete defendas kontraŭ detruaj kritikoj kaj reformproponoj. Aliflanke li pledas por ĝia Esperantigo kaj malpermeso de dediĉaj personaj nomoj, kiuj siaopinie fuŝas la latinecan aspekton de la animalonimoj. Tiu ĉi multjara klopodado pri nomenklaturaj, onomastikaj kaj vortstrukturaj problemoj trovis sian provizoran finan rezulton en la "Propono pri regularo de Zoologia kaj Botanika Nomenklaturado" - 15paĝa broŝureto, kiun li preparis kaj eldonis kunlabore kun la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA. En TEC, kiu oficiale fondiĝis 1987, li dekomence kunlaboris. Ne nur kiel Landa Re prezentanto por Norvegio kaj gvidanto de Terminologia Komisiono por Biologio, sed ankaŭ kiel "ponto" al la Akademio de Esperanto. En ĝia kadro li fondis specialan komisionon por la lingva kontrolo de terminaroj, kiuj jam pasis la normigan procedon laŭ terminologiaj vidpunktoj. Bedaŭrinde tiu promesplena kunlaboro restis en *statu nascendi*, ĉar la enormaj ŝanĝiĝoj en Eŭropo dum la lastaj jaroj aldoniĝis al la komunaj kaj specialaj problemoj en la Esperanto-Movado kaj provizore haltigis la pretendemajn strebojn de TEC.

Tiuj "specialaj problemoj" de la E-movado ja estas bone (pli trafe: malbone!) konataj: manko de mono, manko de kompetentaj homoj, aparte manko de kvalifikitaj, motivitaj, junaj aŭ mezaĝaj homoj por gvidaj taskoj. Sen ili nek TEC, nek ISAE, nek iu alia scienca aŭ faka laboro *en* kaj *por* Esperanto povos atingi la nepre necesan nivelon. Ni esperu, ke *Carl Stop-Bowitz* daŭrigu sian tiom utilan sciencan kaj por-Esperantan laboron, kaj ke aldone lia modelo instigu junajn sciencistojn transpreni la taskojn kaj solvi ilin en rapide ŝanĝiĝanta mondo, per novaj rimedoj kaj ŝancoj, kun la idealismo de niaj pioniroj.

Wera BLANKE

## Ĉu vi estas *Homo sapiens* aŭ \*Antropo regnotipa\*? \*

Neil CUMBERLIDGE (US)

Sekcio Biologio, Nordmiĉigana Universitato, Usono

Rüdiger SACHS (DE)

Sekcio Natursciencoj, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

### Resumo

Multaj sciencistoj lernis, vivi kun la malavantaĝoj, neperfektecoj kaj ekscentraĵoj de la nuntempa tradicia nomiga sistemo internacie uzata en ĉiuj natursciencaj kampoj. Aliaj estas malfeliĉaj pri la malkonvenaj, ofte eĉ ne elparoleblaj sciencaj nomoj de bestoj kaj plantoj. Estas precipe tiu fakto, kiu kaŭzas ĉe multaj biologoj malkontentecon pri la ekzistanta nomenklaturado - tute ne iu forta deziro al pli simpla regularo aŭ pli logika strukturo en iu pli bone superrigardebla sistemo. Sed ne malmultaj sciencistoj nur malvolonte forigus konatan kaj fidindan konvencian sistemon, kiu sufiĉe bone funkcias, por anstataŭi ĝin per nomiga sistemo pli logika, terminologie pli ekonomia, lingvaje pli bone memorebla, eble ankaŭ pli facile uzebla, kiel sin prezentas la Nova Biologia Nomenklaturado (NBN). La aŭtoroj pritraktas kaj komparas kelkajn fundajn diferencojn inter NBN kaj la ekzistantaj konvenciaj sistemoj el vidpunkto de sciencistoj kun intima rilato al zoologia taksonomio.

### Enkonduko

Post redakto en 1969 kaj unua publikigo en 1971, kaj post iu kvazaŭ letargia ekzisto dum dudek jaroj, la Nova Biologia Nomenklaturado (NBN)

\* La aŭtoroj omaĝas al prof. d-ro *Carl Stop-Bowitz*, estinta prezidanto de ISAE 1946-1949 kaj 1981-1996, dediĉante al li tiun ĉi artikolon.